

## AUSCHWITZ

(F. Guccini)

esperantigo: E. Rovere (Manĉel)

Mi mortis, estis nur infano,  
kun multaj idoj, multegaj pli ol cento,  
perfortigita tra tubo de kameno  
kaj nun mi estas tie ĉi en vento.

En Auschwitz, dum faladis neĝo,  
leviĝis ĉielen fumego akra, densa,  
en kor' frostiĝis la vana preĝo  
de mizeruloj per sufer' intensa.

En Auschwitz, mil kaj mil da homoj,  
super ili regis terure la silento:  
jam nur numeroj, jam ne plu personoj  
dispeliĝis ĉiuj tie ĉi en vento.

Demandas mi kiel povis homoj  
mortigi tiom da siaj similuloj,  
sed oni igis nin – pli ol kvin milionoj –  
nur la nigra cindro de tiu ĉi nebulo.

Refoje nun tondras la kanonoj,  
ne estas ĝis nun plensataj kaj kontentaj  
je ruĝa sango la bestiaj homoj  
kaj forte blovas de malamo ventoj.

Esperas mi, ke tra l'homaro  
vastiĝos baldaŭ la frateca sento  
kaj en ĉielo, super ter' kaj maro  
kvietiĝos fine la fiega vento.

Jes, kredas mi, ke la homaro  
kapablos vivi en paco kaj konsento  
kaj en ĉielo, super ter' kaj maro  
nur Amo flugos en la milda vento,  
nur Amo flugos en la milda vento!